

Jarraporto 2011

(traktota en la landa kunveno 2013)

(La etliteraj teksteroj estas citaĵoj el la laborplano 2011–2013.)

A. Ekstera informado

Amaskomunikiloj

La estraro prioritatas havigi preparolon pere de la amaskomunikiloj, ekzemple tiel:

- dissendante gazetarajn komunikojn pri novaĵoj
- instigante la klubojn informi lokajn amaskomunikilojn kiam okazas io interesa
- instigante al la membroj verki leterojn de leganto pri debatata afero kiam la cirkonstancoj invitas al mencio de Esperanto

Dum 2011 registriĝis 17 gazetaj intervjuoj, artikoloj, nekrologoj k.s. kiuj menciis Esperanton aŭ temis pri ĝi, 4 leteroj de legantoj kaj 5 noticoj. Aldone registriĝis 4 intervjuoj aŭ mencioj en radio (unu el ili ankaŭ fariĝis retgazeta artikolo) kaj unu intervjuo en televido.

Interreto

La estraro prioritatas la retpaĝojn de NEL, tiel:

- certigante, ke www.esperanto.no havu redaktoron kiu respondecu pri konstanta ĝisdatigado
- prizorgante, ke informoj pri Esperanto ĝenerale, pri kursoj kaj aktualaj eventoj kaj pri havebla literaturo estu troveblaj rete

Ni uzis nian propran servilon, situantan en la oficejo de Jardar Eggesbø Abrahamsen, kiu respondecis pri ĝi kaj teĥnike kaj enhave. La servilo havas kaj retpaĝojn kaj retpoŝtan sistemon.

Niaj retpaĝoj enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, liston de kontaktpersonoj, kaj informojn pri aĉetebla literaturo, aranĝoj ktp. Oni afiŝadas la estrarajn protokolojn de NEL. Krom tio la ĝisdatigoj estis maloftaj, parte ankaŭ pro manko de novaĵoj.

NJE havas siajn retpaĝojn en aparta servilo, kie publikiĝis ĉiu numero de *Inter Ni Dirite*. La paĝaro de NEL ligas al la paĝaro de NJE.

- konsiderante ĉu NEL ĉeestu en aktualaj retsocioj

NEL havas konton ĉe Twitter (@esperantonytt), kie aperis manpleno da mesaĝoj dum 2011.

- ofertante helpon al aliaj organizoj kiuj deziras krei retpaĝojn en Esperanto

La estraro ne prioritatis tion pro manko de homfortoj.

Informbudo/prelegoj

Ĉiuj informoj estu sobraj kaj precizaj. Por pli bone informi pri Esperanto la estraro konsilu membrojn pri:

- vizitoj en lernejoj kaj organizaĵoj por informi pri Esperanto
- informbudoj kaj disdonado de informiloj surstrate aŭ ĉe foiroj, ekz-e studentaj tagoj, lokaj kulturaj eventoj, internaciaj aranĝoj kaj simile

Bjørn Øyen en Oslo starigis informbudojn, unu el ili en periodoj plurfoje semajne, ĝenerale ĉ. 4 horojn tage dum entute ĉ. 20 tagoj. La klubo de Tromsø havis informbudon kaj prelegojn dum

Internasjona loko.

Informado en la norvega

La estraro prioritatas eldoni informojn pri Esperanto en la norvega, ekzemple aktualajn broŝurojn.

La estraro decidis eldoni novan faldfolion, sed ne havis kapaciton plenumi tiun decidon en 2011.

Informpetoj

Venis manpleno da informpetoj dum 2011, kaj rete kaj ĉe porde en la oficejo en Oslo.

B. Instruado

Ĉeestaj kursoj

La estraro ĉiujare instigas, kaj se necese helpas plifaciligi, ankaŭ ekonomie, ke lokaj kluboj aranĝu kursojn por novuloj.

En 2011 okazis kurso por ĉ. 5 personoj en Tromsø. Aliaj kluboj ne raportis pri kurso.

Interretaj kursoj

La estraro prioritatas, ke vizitantoj al niaj retpaĝoj facile trovu altkvalitajn interretajn esperantokursojn.

En la TTT-ejo estas ligiloj al la plej aktualaj kursoj. Pluraj membroj de NEL aktivis pri kursoj kiel lernu.net, sed la estraro mem ne okupiĝis pri la afero.

Al plenumintoj de kursoj la retpaĝoj de NEL atentigas pri la konstanta oferto de

la legaco Uhlen pri subvencio al junuloj por ilia unua internacia Esperanto-aranĝo. Kursanoj konataj al ni ricevu ankaŭ oferton pri membreco.

Ankaŭ en 2011 NEL ne ofertis akompananton, sed la legaco Uhlen daŭre havas paĝon en nia retejo.

Ekzamenoj

La Ekzamena Komisiono konsistas el Otto Prytz (prezidanto), Gunleik Bergrud kaj Karl Johan Grønning. La komisiono ne aktivis en 2011. Per ligo en la hejmpaĝo de NEL estas rete konsultebaj: la ekzamena regularo, la programo por la Elementa Ekzameno, kaj la programo por la Meza Ekzameno.

Instruantoj

La estraro prioritatas subtenon al membroj kiuj deziras lerni instruadon de Esperanto.

En 2011 la estraro permesis al membro uzi NEL-on kiel referencon por pedagogia kurso. La membro tamen ne havis la okazon partopreni.

C. Kontakto kun la kluboj kaj membroj

Kluboj

La estraro tenas kontakton kun la kluboj kaj ofertas/interŝanĝigas ideojn por ilia aktivado.

La estraro esploras la eblecon oferti specialajn favorojn al la membroj.

Tiuj taskoj ne prioritatiĝis dum 2011.

Seminario por membroj

La estraro laŭeble aranĝu seminarion por la membroj dum jaroj kiam ne okazas landa kongreso.

En 2011 okazis Landa Kongreso, kaj seminario ne okazis.

Norvega Esperantisto

- La estraro prioritatas labori por
- eldonadi *Norvega Esperantisto*

Ankaŭ dum 2011 nia membrogazeto *Norvega Esperantisto* donadis al la membroj la plej gravajn informojn. La jarkolekto 2011 konsistis el 6 numeroj, du havis 16 paĝojn, unu havis 28 kaj tri havis 20.

Redaktis Douglas Draper; enpaĝigis Douglas Draper kaj Judith Parelle

Faksekcio de instruistoj

La faksekcio ankoraŭ ne estas revivigita. La peradon de la norvegaj ILEI-kotizoj kaj la mastrumadon de la konto de la instruista sekcio prizorgas la kasisto de NEL, Anne Karin Bondhus.

Abrahamsen (bildojn kaj *Inter Ni Dirite*); presis Øien & Indergaard, Trondheim.

Krom al la membroj ni sendis *Norvega Esperantisto* al 2 (2) norvegaj kaj 4 (3) eksterlandaj pagantaj abonantoj, 1 (1) norvega kaj 13 (11) eksterlandaj donacabonantoj, ni sendis ĝin senpage senpage al 4 (4) norvegaj kaj 25 (25) eksterlandaj ricevantoj, kaj interŝanĝe al 16 (19) eksterlandaj eldonantoj de Esperantaj periodaĵoj. Ni sendis la gazeton papere kaj senpage nur al la najbaraj landaj asocioj kaj al tiuj de kelkaj malriĉaj landoj.

Retlistoj

- teni la retroŝtlistojn *NEL-diskut* kaj *NEL-inform* aktivaj

La retroŝtliston por membroj, *NEL-inform*, administris Jardar E. Abrahamssen tra servilo ĉe *Nettverksgrupp*a. Per ĝi estas atingeblaj 61 membroj (64), kaj sendiĝis 132 (61) mesaĝoj.

La diskutliston *NEL-diskut*, malferman por ĉiuj, administris Jardar

Eggesbø Abrahamsen. Sendiĝis 5 (11) mesaĝoj.

Raportoj kaj cirkuleroj

- postuli jarraportojn de la lokaj societoj

Laŭstatutajn jarraportojn pri 2011 sendis la kluboj de Bergen, Hamar, Oslo, Tromsø kaj Trondheim.

Nur Oslo eldonas propran kluban bultenon. La kluboj de Oslo, Sarpsborg, Stavanger, Trondheim kaj Tromsø havas retpaĝojn en TTT.

La Esperantoklubo de Bergen ne kapablis havi ordinarajn kunvenojn en 2011. Tamen kelkaj membroj de la klubo neformale renkontiĝis dum la jaro, kaj 4 membroj partoprenis dum la UK en Kopenhago.

La klubo de Oslo kunvenis proksimume ĉiun duan semajnon krom en feriaj periodoj, kun averaĝe 5,1 ĉeestantoj.

La klubo en Tromsø kunvenis 8-foje dum la jaro. Klubanoj ankaŭ partoprenis kun standardo la procesion la 17-an de majo. Oni aranĝis la Landan

Kunvenon de NEL kaj esperanto-kursojn dum la jaro, kaj partoprenis *Internasjonal uke*, kiu okazis tie en junio.

Grupo Esperantista de Trondheim kunvenis ordinare 13-foje kaj krome okazis jarkunveno kaj du festoj. En la ordinaraj klubkunvenoj partoprenis inter 4 kaj 9 membroj.

La aliaj kluboj ne raportis formale, sed ni informiĝis ke la klubo de Bryne kunvenis unu fojon monate.

- informi la membrojn pri la agado de la estraro

La estraraj protokoloj afiŝiĝis en niaj retpaĝoj, kaj la membrogazeto peris la plej gravajn punktojn.

La estraro kunlaboras kun la klubo kiu gastigos la Landan Kongreson 2011, celante ke la 100-jariĝo de NEL en 2011 estu celebrata en taŭga maniero.

La klubo de Tromsø brile plenumis sian taskon, kaj la komunikado kun la Liga estraro fluis glate. Legaco Uhlen helpis ekonomie.

Ĉ. Aliaj projektoj kaj aplikoj

Vortara projekto

La estraro prioritatas havigi monon por akceli pluevoluigon de la vortara datumbazo.

En 2011 ne okazis vortara laboro, ĉar la responsulo pri la praktika laboro ne

plu laboras pri la tasko. Li verkis raporton pri la afero, kie li ne nur detale prezentas la tehnikajojn, sed ankaŭ konstatas ke la materialo por la nova vortaro estas plejparte kolektita en maniero kiu faras ĝin netaŭga por tia laboro. Interalie mankas multaj

kutimaj norvegaj vortoj, aliflanke estas uzataj multaj strangaj Esperanto-vortoj.

Turismo

Cato Haugen en Oslo aranĝis postkongreson de UEA post la UK. Partoprenis 25 eksterlandanoj.

D. Administrado

Retservilo

La retservilon formale posedas Akademisk esperanto-forum en Trondheim, kaj ĝi situas en la oficejo de Jardar Eggesbø Abrahamsen, kiu ĝin administras.

Je problemoj pri retkonekto aŭ alta temperaturo sendiĝas aŭtomate tekstmesaĝo al la poŝtelefono de Jardar Eggesbø Abrahamsen.

En 2011 oni devis dufoje forŝalti la servilon pro planita forŝalto de elektro en la domo kie situis la servilo. Post la dua reenŝalto okazis pluraj paneoj, kaj provizora riparo necesis.

Oni starigis rezervan servilon ĉe la firmao Initio Medielab (Trondheim), dum ankaŭ plirapidiĝis la preparoj por novaj retpaĝoj en servilo ĉe la sama firmao. La laboron ĉe la servilo de Initio performis Judith P. Abrahamsen.

La oficejo

En la oficejo en Oslo deĵoris ĉefe Douglas Draper, kiu ankaŭ respondecis pri arĥivado.

La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazis per Interreto.

Teknikaĵoj

La formalan komputilan respondecon de NEL havis Ulf Lunde (Os en Hordaland). Herman Ranæs en Trondheim asistis pri komputilaj kaj telefonaj praktikaĵoj.

La Esperanto-Domo (Esperantonia)

NEL posedas duonon de Esperantonia, kaj la Oslo-klubo posedas same multe. La posedantoj dividas inter si la loĝkostojn. En 2008 NEL ofertis al la Oslo-klubo, ke tiu ricevu 60% de ĉiuj luig-enspezoj de Esperantonia, dum la Ligo ricevu 40%, ĉar la Oslo-klubo faras la praktikajn aranĝojn pri luigado. Tiu aranĝo validas ekde 2008. Ĝi validis ankaŭ en 2011.

Membrostatistiko por NEL en 2011

En 2011 NEL havis 8 aliĝintajn klubojn. La klubo en Kristiansand estis malfondata en 2011, pro malalta membronombro. La membronombroj estis en 2011 (2010):

Bergen	13	(12)
Bryne	9	(9)
Hamar	3	(3)
Kristiansand	–	(2)
Oslo	64	(74)
Sarpsborg	6	(7)
Stavanger	6	(6)

Tromsø	19	(19)
Trondheim	17	(19)
Sume	137	(152)
Rektaj	30	(32)
Entute	167	(184)

Eliris 20 (14) membroj kaj mortis 2 (2) membroj. Ni ekhavis 3 (13) novajn membrojn, kaj 2 (3) malnovaj membroj remembriĝis.

Membroj laŭ kategorioj:

Klubanoj		
Ordinaraj	88	(96)
Junulaj	18	(28)
Samdomaj	10	(11)
Dumvivaj	21	(17)
Rektaj		
Ordinaraj	24	(24)
Junulaj	2	(3)
Samdomaj	0	(0)
Dumvivaj	4	(5)

Ekonomio

En 2011 la ĉefkalkulo de NEL montris profiton de 11 861 kr, sed tiu sumo inkluzivas dumvivajn kotizojn (11 600 kr) kaj monon kiun ni ricevis pro la malfondo de la esperantoklubo en Kristiansand (2869 kr). Se tiuj kvar kiuj pagis dumvivan kotizon en 2011 anstataŭe pagus normalan kotizon de 330 kr, ni enspezus 10 280 kr malpli (11600 – 330×4). Tiu sumo estas por estontaj kotizoj kaj do ne estas vera enspezo por 2011. Sen tiu sumo kaj la mono pro la malfondo de la

esperantoklubo en Kristiansand la rezulto estus 11861 – 10 280 – 2869 = –1288.

NEL ricevis 7450 kr donace en 2010. El tiu sumo 1000 kr estis por la propaganda fondaĵo, 5000 kr estis por la domkonto kaj 1450 kr iris al la ĉefkalkulo de NEL. La donaco al la propaganda fondaĵo estis dediĉita al nova broŝuro kiun NEL planas eldoni. Ni elkore dankas pro la donacoj! Ili estas bona helpo al la ekonomio de NEL.

En 2011 la evangelia grupa Smyrna ĉesis luan ejon Esperantonia. Tial la solaj luenspezoj estis pro kunvenoj de kunposedantoj de la najbaraj domoj, entute 1800 kr. La enspezoj pro luigo estas distribuataj per 60% al la Oslo klubo kaj 40% al NEL, kio en 2011 donis 1080 kr al la Oslo-klubo kaj 720 kr al NEL. Tiu distribuo estas ĉar la Oslo-klubo havas la praktikan laboron rilate al la luigo de la ejo

En 2011 la gajno de la domkonto estis 336 kr, sed la domkonto ricevis donacon de 5000 kr, kaj estis preskaŭ neniu elspezo por la ejo en 2011. Tial la bilanco por la domkonto ne estos bona dum la estontaj jaroj se ni ne trovos novajn luontojn.

En 2011 la domluo de kaj NEL kaj la Oslo-klubo estis po 15 200 kr. Tio estas longdaŭre tro multe por la Oslo-klubo, kaj ankaŭ NEL ne havas ekonomion por pagi multe pli. Tial plibonigo de la bilanco de la domkonto

ne estos solvebla nur per kresko de la engagioj de NEL kaj la Oslo-klubo.

La valoro de niaj investoj en Skagen-fondene malkreskis. La valoro de Skagen Vekst malkreskis per 7581 kr, kaj la valoro de Skagen Høyrente kreskis per 1848 kr. La bankkontoj donis interezon de 225 kr. Entute estis malkresko de 5508 kr.

Proksimume 1/6 el la malkresko estis transigita al la propaganda fondaĵo, 1/6 al la instrua fondaĵo, 1/4 al la domkonto kaj la resto al la ĉefkalkulo de NEL.

Legaco Rolf Uhlen

De la komenco la legacon administris Norvega Esperantista Ligo kaj Norvega Esperantista Fervoĵista Asocio (NEFA) kunlabore. La reprezentantoj de NEL en la legaca estraro dum 2011 estis Bjarte Kaldhol kaj Arne Olav Mjøen, kun anstataŭantoj resp. Ester Olsen kaj Torstein Kvakland, elektitaj dum la Landa Kunveno en 2009. Laŭ estrara decido de NEL en januaro Helge Knudsen transprenis la postenojn de Ester Olsen pro ties malsano. Novaj reprezentantoj de NEL ekde 2012 elektitaj dum la Landa Kongreso en julio estas Torstein Kvakland kaj Arne Olav Mjøen, kun anstataŭantoj resp. Judith Parelle Abrahamsen kaj Helge Knudsen.

En 2010 NEFA en praktiko lasis la legacan laboron al NEL, kaj aktualiĝis la bezono pri nova statuto kiu respiegulu tion. En januaro 2011 NEL

kontaktis NEFA telefone, kaj poste sendis al NEFA proponon pri nova statuto por la legaco. Legaco Uhlen havis estraran kunvenon en novembro por diskuti la aferon, sed dum la kunveno la reprezentantoj de NEFA raportis ke ili ne povas memori esti ricevintaj la proponon. La legaca estraro tial ne povis trakti la aferon. NEFA aranĝis voĉdonadon inter siaj membroj, kaj mesaĝis al NEL en decembro ke NEFA kontraŭas ŝanĝon de la statuto, kaj ke ili nomumis novajn reprezentantojn por la legaca estraro.

Norvega Junularo Esperantista

La landa kunveno de NJE elektis la jenan estraron:

- prezidanto: Leif Arne Storset (reel.)
- vicprezidanto: Amelie Matt (nova)
- sekretario: Einar Faanes (reel.)
- kasisto: Hilde Lagnason Bye (nova)
- estrarano: Kristoffer Haug (nova posteno)

En 2010 la estraro elektis Einar Faanes kiel komitatanon A por TEJO, ĝis la venonta elekto en 2012. NJE kun Finnlanda esperantista junulara organizo (FEJO) aranĝis apud kaj en Helsinko *Nordian Renkontiĝon*, kiun partoprenis tri el Norvegio. *Mojosa vespero* estis iniciatita dum la jaro kiel libertema renkontiĝo kiu okazas samtempe hejme ĉe membro Osloa kaj rete per rettelefono je la ĝuo de eksterurbaj interesatoj. Ĝi okazis dum 2011 kvin fojojn. En 2011 NJE havis 20 membrojn (31 en 2010).

Biblioteko

Centra responsulo pri la biblioteko estas Douglas Draper. La ĉefa libra kaj revua kolektoj estis antaŭe stokitaj en la biblioteka domo en Hamar, kiu tamen mem bezonis la lokon. En 2010 45 skatoloj da libroj tial sendiĝis la la Nacia Biblioteko en Mo i Rana, dum 30 skatoloj transportiĝis al Esperantonia, kie la libroj estas stokataj kune kun la libroj de la Oslo-klubo. Dum 2011 la klubo ordigis la kombinan libraron en bretaroj en la kunvenĉambro. Per tio liberiĝis la bretaro en la eksvestejo por duoblaĵoj de periodaĵoj. Pliaj periodaĵoj restas en la interna kelo.

Studenta Esperantosocieto

NEL kaj la Studenta Esperantosocieto (en Oslo) daŭre havas bonajn rilatojn.

Kunlaboro kun NEFA

Norvega Esperantista Fervojiista Asocio (NEFA) kaj NEL kunlabore administris la Legacon Rolf Uhlen dum multaj jaroj.

Internacia organizo

Komitatano A de UEA estis Torstein Kvakland. Li sekvas la diskutojn en la komitata retpoŝta listo kaj en nia propra estrara listo.

Ĉefdelegito de UEA estis Agnar Fitjar. Li peris informon de UEA pri 45 membroj de NEL kiuj estis individuaj membroj de UEA en 2011 (33 en 2010), laŭ kategorioj jenaj:

Membro-Abonanto	16
Membro-Abonanto TEJO	0
Societo Zamenhof	6
Membro kun Jarlibro	13
Membro kun Jarlibro TEJO	3
Dumviva Membro	6
Dumviva Membro kun Jarlibro	1
Honora Membro	1

La Honora Membro estis Elna Matland. Ŝi estis Honora Membro de 1992 ĝis sia morto en novembro 2011. Per ŝia forpaso la norvega Esperantomovado perdis unu el siaj plej aktivaj membroj iam ajn.

Universala Kongreso

24 norvegoj aliĝis al la UK en Kopenhago (2010 en Havano: 8), kaj almenaŭ 3 vizitis per unutagaj kartoj. Turisma Servo de NEL (responsulo Agnar Fitjar) akceptis kongreskotizojn kaj peris 14 el la aliĝoj.

Kunlaboro kun ne-Esperantaj organizoj

Ankaŭ dum 2011 NEL estis membro de la studasocio *Populus – studieforbundet folkeopplysning*. En la jarkunveno reprezentis NEL-on Douglas Draper. En novembro la studasocio kunfandiĝis kun Bygdefolkets studieforbund, kun realiĝo ekde la 1a de januaro 2012. La nova studasocio nomiĝas *Studieforbundet næring og samfunn*.

La estraro de NEL dum 2011

La Landa Kunveno en junio elektis la jenan estraron:

- prezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
- vicprezidanto: Ulf Chr. Lunde (reel.)
- sekretario: Ingebjørg Rambjør (reel.)
- kasisto: Anne Karin Bondhus (reel.)
- estrarano: Mario Machlik (nova)
- estrarano: Asbjørn Lindh (reel.)
- anstataŭanto 1: Eli Eriksen Fitjar (reel.)
- anstataŭanto 2: Arne Olav Mjøen (reel.)

E. Konkludo

En 2011 NEL festis sian centjariĝon. Dum la jubilea jaro aperis pro pluraj kialoj multaj mencioj en amaskomunikiloj.

La drasta kaj plurjara malkresko de la membraro ripozis dum 2010 sed denove plifortiĝis en 2011, per redukto de 17 membroj. Inter tiuj 17 estis 11 junuloj, multaj el ili tamen estis membroj dum nur unu jaro.

La domkonto havis profiton nur pro donacoj. La relative belaspekta profito de NEL multe ŝuldiĝas al tio, ke ni apenaŭ havis elspezojn krom la neeviteblaj.

Mankas ĝenerale homfortoj. Dum 2011 ankaŭ ne eldoniĝis nova broŝuro, kvankam ni intencas fari tion dum 2012. Ne okazis vortara laboro, sed atingis nin raporto kun priskribo de la laboro kaj kelkaj rekomendoj.

Aliflanke la membrogazeto daŭre estas altkvalita kaj aperadis regule. Okazis bone aranĝita Landa Kongreso, la junulara organizo aktivis kaj aranĝas kunvenojn. Ankaŭ la kluboj kunvenas pli-malpli regule. Komenciĝis la preparoj por novaj retpaĝoj.

Norvega Esperantista Ligo travivis siajn unuajn cent jarojn. La defioj por la organizo povas esti aliaj nun ol en la komenco, tamen tio signifas ke ni ankaŭ havas tute aliajn eblecojn ol en la komenco. Nia defio nun estas ekspluati tion.

La 31an de decembro 2011/ la 6an de aŭgusto 2012.

La Liga Estraro

Jardar Eggesbø Abrahamsen

Ulf Chr. Lunde

Anne Karin Bondhus

Ingebjørg Rambjør

Mario Machlik

Asbjørn Lindh

Eli Eriksen Fitjar

Arne Olav Mjøen